MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

ESPERANTO INFORMILO 6

JUNIO 2023 Kol. 457/39

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo**: La 39-a PSI Lanĉo en Olomouc Ekskurso al Krakovo

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## La 39-a Printempa Semajno Internacia
## 3. - 10. de aprilo 2023

Post trijara paŭzo povis denove okazi ĉeesta aranĝo PSI en bela Luter-urbo *Wittenberg,* kiu situas en la germana federacia lando Saksio-Anhaltio apud la rivero Elbo. La partoprenantoj loĝis en komforta junulara gastejo proksima al la historia centro de la urbo Vitenbergo. Al la aranĝo aliĝis 113 geesperantistoj el kvin landoj. PSI okazas en la semajno, kiam oni festas Paskon. Partoprenas ĝin multaj familioj kun infanoj, por kiuj estas ĝojige en la dimanĉa pasko-festo serĉi ĉokoladajn ovojn kaj aliajn dolĉaĵojn. Ili ankaŭ havas programon por sin amuzi kaj lerni Esperanton, dum la plenpreskuloj povas sekvi diversajn prelegojn, diskuti pri diversaj temoj. En la programo estis proponitaj diversaj ludoj, jogo, ĉigongo, ĵonglado, origami, ŝtof-kolorigado, ĉina ŝako, konstruado de paperturoj, akrobataĵoj, malstreĉa gimnastiko, zumbao. Eblas lerni Esperanton kun spertaj instruistoj, aĉeti esperantaĵojn en libroservo. La etuloj ŝatas desegni, kolorigi ne nur ovojn, rigardi Mazi-filmon, kunaktori kaj tiamaniere ili lernas Esperanton.

Alloga estis ekspozicio de portretoj kaj libroj de Helga Plötner. Ŝi estas pasia kaj talenta por portreti famajn esperantistojn. La

kvin libroj, ĉiu po 16 bildoj kaj interesaj rakontoj, estis eldonitaj pere de la eldonejo Horiozonto de Jasuo Hori en Japanio. Ŝi donis instrukciojn kiel portreti kaj mem liveris necesan materialon.
Dum diversaj prelegoj ni povis ekscii pri *Bauhaus*-arkitekturo kaj poste spekti ĝin propraokule dum la tuttaga ekskurso. Dum alia prelego pri biciklado kun BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia), ni eksciis pri organizitaj karavanoj, biciklistaj semajnoj aŭ unutagaj ekskursoj. Aldone ni estis informitaj pri "VeloRElo" - la projekto pri bicikloj en trajnoj. Ĉirilate Esperanto bone taŭgas por internacia kunlaboro.

Pri sia sperto dum la trajnvojaĝado al la 107-a UK en Montrealo rakontis André Weber. La prelego pri "Lingva terapio de la lernantoj kun milda intelekta neplenkapablo" informis pri "Centro pri plurlingvismo kaj interkultura komunikado PLURIKO". En alia prelego oni komparis la anglan kaj la Esperantan lingvojn. En ĉi tiu vintra sezono estis bone paroli pri imuneco, vitaminoj, nutrado kaj uzo de sovaĝaj plantoj kiel nutraĵo. Dum tiuj prelegoj ni estis informitaj pri multaj interesaĵoj. Ankaŭ la klimata krizo kaj la rolo de Esperanto en tiu sfero estis la temo de ĉi-semajna renkontiĝo.

Dum la semajno okazis multaj enurbaj kaj eksterurbaj ekskursoj. La interesatoj povis elekti inter vizitoj de diversaj muzeoj en la urbo mem, grimpi kastelan turon, uzi turisman trajneton, viziti domon *Luterhaus*, bierfarejon aŭ keksfabrikon kaj ankaŭ sperti noktan promenon tra Vitenbergo. Tre interesa kaj ŝatata por infanoj estis la bestoĝardeno en la proksimo de nia loĝloko. Ĝi estas la plej malgranda zoologia parko en Germanio, sed tamen havas grandan diversecon de malgrandaj bestoj, ekzemple mamuloj, birdoj, fiŝoj, serpentoj ktp. Eksterurbe eblis viziti la

parkon de *Wörlitz,* kiu apartenas al la mondaj heredaĵoj de UNESCO, Ferropolison, kiu iam estis brunkarba minejo, muzeon pri la film-industrio *Wolfen,* iaman fabrikon de filmproduktado kun ekspozicio de pli ol 800 fotoaparatoj. Ankaŭ ekskursoj por biciklantoj estis programitaj.



Dum vesperaj programeroj eblis spekti diversajn filmojn, ĝui gitarkoncerton de Feri Floro. Li prezentis latinamerikajn ritmojn ĉefe el Kubo, sed ludis ankaŭ siajn proprajn amkantojn. Speciale por infanoj estis dediĉita la pupteatro "Drakofajro" de Christoph Frank. Okazis mezepoka kostumita balo kaj paska fajro ekstere kun bastonpano kaj kantado. Ne mankis paska nokta diservo. La lasta internacia vespero de la semajno estis dediĉita al artaj kontribuoj de la partoprenantoj mem. Ni spektis infanajn akrobataĵojn, rakontojn, kantojn, ŝercojn, ludojn ktp.

La organiza teamo preparis buntan programon kaj meritas grandan dankon pro la laboro, dank' al kiu ni ĝuis agrablan semajnon en bona harmonio. Ĉiuj estas invitataj al la venontjara 40a PSI, kiu okazos en Bavario en la urbo *Bayreuth* ekde la 25-a de marto ĝis la 1-a de aprilo 2024.

*Liba Gabalda*

**LANĈO DE NOVAJ LIBROJ**
**Olomouc, la 11-an de majo 2023**

Jaŭde la 11-an de majo 2023 je la 14-a horo kolektiĝis en klubo por emeritoj en Olomouc (Klub seniorů, Polská 57) kvindeko da personoj, parte esperantistoj, parte lokaj emeritoj inkluzive de ilia muzika grupo, por lanĉi novajn librojn de KAVA-PECH.
La urbo Olomouc estis elektita pro tio, ke unu el la tradukintoj, Jan Duda, loĝas en tiu ĉi urbo.



Laŭlonge de la muro estis tabloj kun aliaj libroj de la eldonejo, esperantlingvaj kaj ĉeĥlingvaj, kiujn ĉiuj povis aĉeti. Ĉe la tablo frunte de la salono sidis kun Jan Duda ankaŭ Pavol Petrík el Slovakio, kiu esperantigis unun el la novaj libroj.

Precize je la 14:30 horo la prezidanto de la klubo por emeritoj malfermis la kunsidon, bonvenigante siajn membrojn kaj esperantistojn, poste li transdonis la vorton al s-ro Machačík, prezidanto de la loka Esperanto-klubo. Tiu unue klarigis, ke la aranĝo okazas omaĝe al Jan Duda, kiu dediĉas sin al Esperanto ekde sia 12-a jaro, poste li priskribis la historion de la Esperanto-klubo kaj ĝia kunlaboro kun loka Patrujscienca Muzea Societo, ĉe kiu estiĝis en 2003 Esperanto-sekcio.



Petr Chrdle prezentis la novajn librojn. La libron **Sadako volas vivi** esperantigis Jan Duda. Aperis kelkaj problemoj kun la aŭtorrajtoj, sed post iom da tempo feliĉe oni akiris kopirajton kaj la majstra traduko de Jan Duda povis ekvivi.
La libron **Bluaj neĝoj** de Pjotr Bednarski esperantigis Ewa Grochowska, kiu ne ĉeestis. La libro rakontas pri infanaj travivaĵoj de la aŭtoro en soveta gulago.
**Jarsezonoj kaj festotagoj de bestoj** de Eva Buttová, libro esperantigita de Pavol Petrík, priskribas por infanoj la vivon de Jesuo. Ilustris Mirka Tomečková.



**Mia vivo kun Esperanto** estas rakontado de la eldonisto Petr Chrdle mem. Pasintjare li eldonis siajn travivaĵojn spertitaj en Ĉinio, Koreio kaj Japanio, sed li vizitis ankaŭ aliajn landojn kaj havis tie interesajn travivaĵojn, kiujn li prezentas en la nova libro.
Ĝuste antaŭ la forveturo al Olomouc li ricevis el presejo la plej freŝan libron **Ekster la limo**, kio estas apokrifoj de nederlanda esperantisto Gerrit Berveling (kiu ne ĉeestis). Apokrifoj estas frukristanaj tekstoj, kiuj ne estis akceptitaj en la oficialan Novan Testamenton, tamen ili konserviĝis ĝis nia tempo.
Petr Chrdle proklamis, ke li ne ŝatas „bapton“ - lanĉon de libroj, kutimon en Ĉeĥio, kiam oni verŝas sur novan libron iom da ĉampano, ĉar li bedaŭras kaj la vinon kaj la libron. Tial li anstataŭ baptopatr(in)ojn invitis sortopatr(in)ojn, ke ili simile kiel fabelaj sortofeinoj deziru al la nova literatura bebo sukcesan vivon.

Dum la aranĝo oni fakte lanĉis tri librojn: **Sadako, Jarsezonoj** kaj **Mia vivo kun Esperanto.** La du sortopatroj kaj unu sortopatrino deziris al tiuj ĉi libroj bonan sorton kaj longan vivon.



Dum la programo prezentis sin la muzikgrupo per bela mu-ziko.

Poste oni tostis kaj manĝis preparitajn bongustaĵojn.

La festo de la libroj estis vere sukcesa!

MM

# Ekskurso al Krakovo

Sabate la 22-an de aprilo forvojaĝis 12 membroj de la Praga klubo E-mental´ viziti esperantistojn en la pola urbo Krakovo. Pro rapido kaj komforto ni decidiĝis por aviadilo, la normala aviadila linio.

Kia estis nia surprizo, kiam la aviadilo (laŭdire pro teĥnika difekto) ekflugis nur je la dua starto. Sed tio ne estis la lasta surprizo, la plua atendis nin post unu horo de la flugo ĉe la alterigo ne en Krakovo, sed en Katovice. De ĉi tie ni daŭrigis al 100 km malproksima Krakovo per busoj. Pri ia rapida kaj komforta vojaĝo oni ne povus paroli. Problemo estis ankaŭ kun tramoj, pro maratono en la urbo.

En Krakovo atendis nin jam nia Vítek kaj pola esperantistino Romualda, kiu prizorgis nin dum la tuta tempo de nia restado.

Post la antaŭokaza pikniko kun aliaj polaj esperantistoj borde ĉe la rivero Vistulo ni promenis tra la kastelo Wawel, iama rezidejo de polaj reĝoj. Ankaŭ la ĉeĥa reĝo Ladislav Jagellonský



naskiĝis ĉi tie. Sube de la kastelo ni vidis ankaŭ drakon kraĉantan fajron 😊. La tuta subkastela domar-kvartalo vivis – tio estas spaco por surstrataj artistoj, kioskoj kun specialaĵoj „paczki", „obwarzanki" kaj „precli", ankaŭ spaco por piknikoj sur herbejo.

Dimanĉe ni povis trapaŝi la Malnovan Urbon. Ni vizitis la kastelan korton, foirhalon Sukiennice, la ĉefplacon kun la Maria preĝejo, ni faris foton kun statuo de la papo Jan Pavel II. (Johano Paŭlo la Dua). Ni gustumis ankaŭ krakovajn specialaĵojn, ekz. „bigos" aŭ „pierogy".



Krakovo estas dua la plej granda pola urbo – historia reĝa rezidejo kaj urbo de monumentoj. Bedaŭrinde ni havis malmulte da tempo, pro tio ni atingis nek la judan kvartalon nek la faman bildon de Leonardo da Vinci „Damo kun neĝmustelo“.
Eble venonte….

S. Nováková


**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537 970**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.